

Bubala Kaj Mustanga Ĉaso

Ni rajdis vigle en la bela aŭtuna mateno kaj parolis pri la planata fervoja projekto, kaj pri ĉio alia, kio nin okupis. White donis al mi la necesajn indikojn por la alligo al sia sekcio. Je la posttagmezis ni haltis kaj paŭzis apud akvejo. Post tio White rajdis plu kun sia scout, kaj restis ni ankoraŭ kelkan tempon kuŝante, pro interparoli.

Mallonge antaŭ ni ekrajdis reen, mi kliniĝis ĉe la akvo pro ĉerpi akvon per la mano kaj trinki. Tie mi vidis, tra la kristalklara likvaĵo premitaĵon sur la fundo, kiu ŝajne estis farita de piedo. Mi atentigis Sam Hawkens pri tio. Li rigardis la spuron longe, kaj grumblis:

„Mr. White tute pravis, ke li avertis nin pri la indianoj.“

„Ĉu Vi opinias, ke tiu spuro estas farita de indiano?“

„Jes, de indiana *mokassin*. Ĉu tio ne kaŭzas al Vi strangan senton en Via stomakejo, *Sir?*“

„Tute ne.“

„Sed Vi ja pensas aŭ sentas ion, ĉu ne?“

„Kion mi pensu, krom ke ruĝulo estis tie ĉi?“

„Do Vi ne sentas timon, ĉu?“

„Ne vere.“

„Certe, ĉar Vi ja ne konas la ruĝulojn.“

„Sed mi esperas ekkoni ilin. Certe ili estas same kiel ĉiuj aliaj homoj, do malamikoj de iliaj malamikoj kaj amikoj de iliaj amikoj. Do ĉar ne estas mia intenco trakti ilin malamike, mi supozas, ke mi ne timu ian malamikecon de ili.“

„Nur ĉar Vi estas *greenhorn*, kaj Vi ĉiam estos. Certe Vi ja rajtas havi bonajn intencojn, kiel trakti la ruĝulojn. Tamen ĉio okaziĝos alie. La okazoj de dependas de Via volo. Vi ekscios tion, kaj mi nur esperas, ke tiu ekkono ne kostos al Vi danĝeran elŝiron da homkarno el Via propra korpo, aŭ eĉ la vivon mem.“

„Kiam tiu *indsman* estis tie ĉi, laŭ Via opinio?“

„Ĉirkaŭ du tagojn antaŭe. Ni povus vidi liajn spurojn ankaŭ tie ĉi en la herbaro, se ĝi ne estus restariĝinta intertempe.“

„Do skolto, ĉu?“

„Skolto por bubalviando, jes. Estas nun paco inter la ĉi regionaj triboj, tial ĝi certe ne estis milita skolto. Krome la ulo estis eksternorme nesingarde, do verŝajne ankoraŭ juna.“

„Kial?“

„Sperta militisto ne metas sian piedon en akvaĵon kiel ĉi tiu, kie la premaĵo restas kaj estas videbla ankoraŭ longe poste sur la malprofunda sablo. Tian stultaĵon povas fari nur stultulo, do *greenhorn* ruĝa, same kiel Vi estas blanka, hihihhi. Kaj kutime blankaj *greenhorn*-oj estas eĉ pli stultaj ol la ruĝaj. Memoru tion, *Sir!*“

Li subridis mallaŭte kaj ekstaris pro ĝi sur sian ĉevalon. La bona Sam ĝin amis komprenigi al mi sian elkoran simpation deklarante, ke mi estus stulta.

Ni povis rajdi reen laŭ la sama vojo, laŭ kiu ni venis. Sed kiel *surveyor* ĝi estis mia tasko esplori la areon. Tial ni unue rajdis flanken, kaj tiam resekvis la direkton.

Baldaŭ ni venis en sufiĉe larĝan valon, kiu estis kovrata per malhele verda herbaro. Sur la deklivoj je ambaŭ flankoj kreskis sube arbedoj, kaj pli supre arboj. La valo estis duonan horon da rajdadon longe kaj tiel tutrekte, ke oni povis vidi tra ĝi de la komencaĵo ĝis la finaĵo. Ni estis rajdintaj nur kelkajn paŝojn, kiam Sam subite haltigis sian ĉevalon kaj atente rigardis antaŭen.

„*Heigh-day!*“ li elpuŝis. „Jen ili estas! Jes, vere, jen ili estas, la ekunuaj!“

„Kiu?“ mi demandis.

For antaŭe de ni, mi vidis ĉirkaŭ dek ok ĝis dudek malhelajn punktojn, kiuj moviĝis malrapide.

„Ĉu kiu?“ li ripetaĉis mian demandon, kaj moviĝis ekscigite jen kaj reen sur la selo. „Hontu elparoli tian demandon! Vi certe estas *greenhorn*, fakte tute ega! Uloj kiel Vi ne kapablas vidi eĉ per malfermaj okuloj. Do havu la amikecan inklinon, plej estimata *Sir*, nu diveni, kiaj kreaĵoj tiuj estas, al kiuj Viaj belaj okuloj direktiĝas!“

„Ĉu diveni? Hm! Mi supozus, ke ili estas kapreoloj, se mi ne sciu, ke tiu bestospeco kunvivas en aroj de ne pli ol dek ekzempleroj. Ankaŭ mi konstato, per konsidero pri la distanco, ke la bestoj tie certe estas pli grandaj ol kapreoloj, kvankam ili ja aspektas tiel malgrande de tie ĉi.“

„Kapreoloj, hihihhi“, Sam ridis. „Kapreoloj, tie ĉi alte apud la fontoj de la Canadian! Tio estas majstraĵo! Sed Via alia divenaĵo estis ne same malbone supozata. Jes, ili estas pli grandaj, tiuj bestoj, multe pli grandaj ol kapreoloj!“

„Do eble estas bubaloj, ĉu?“

„Ja certege bubaloj! Estas bizonoj, veraj bizonoj, sur la vojo suden, la unuaj, kiujn mi vidas ĉi jare. Nun Vi scias, ke *Mr. White* pravis: bizonoj kaj indianoj. De la ruĝuloj ni nur vidis premaĵon de piedo. La bubalojn ni havas antaŭ ni en vivvera grandeco. Kion Vi diras pri tio, se mi n'erasas?“

„Ni rigardu ilin!“

„Rigardi, ĉu? Ĉu rigardi, vere?“ li demandis min, dum li vidis al mi de la flanko mirigite.

„Jes. Mi neniam vidis veraĵajn bizonojn antaŭe, kaj mi ŝate volas kaŝrigardi tiujn bestojn antaŭ ni.“

Mi sentis nur la ĝojon de bestamanto. Al la malgranda Sam tio ne kompreneblis. Terurigite li kunbatis la manojn, kaj diris:

„Kaŝrigardi, nur kaŝrigardi! Ĵus kvazaŭ eta knabo metas sian okulon al la truo en la ligno de kunikla stalo, pro kaŝrigardi kuniklaĉojn! Ho *greenhorn*, kion mi spertu kun Vi! Mi ne kaŝaŭskultos, aŭ kaŝrigardos, sed ĉasos ilin, vere ĉasos!“

„Ĉu hodiaŭ, dimanĉe?“

Mi diris tion nepripensinte. Li vere ĉagreniĝis, kaj furiozis al mi:

„Bonvolu kunteni Vian bekon, *Sir!* Vera okcidentulo ne ade demandas pri la tago, kiam li ekvidas la unuajn bubalojn antaŭ si! Tio signifas viando, komprenende, viando, kaj kia, se mi

n'eraras! Peco de bizona lumbo estas multe pli bonega ol la paradiza ambroziuso aŭ ambroziano, aŭ kiu ajn estas la nomo de per kio nutriĝis la grekaj dioj. Mi havu buballumbon, eĉ se ĝi kostu mian vivon! La vento blovas kontraŭ ni, tio bonas. La suno brilas tie ĉi sur la nordan deklinon de la valo. Sed tie dekstre estas umbro. Kiam ni kaŝiĝas tie, la bestoj ne ekrimarkos nin antaŭtempe. Venu!“

Li kontrolis sian Liddy:n, ĉu la du tuboj estis enordaj, kaj irigis sian ĉevalon transe al la suda valmuro. Mi agis kiel li kaj kontrolis mian ursmortigilon. Li vidis al mi, tuj haltigis sian ĉevalon kaj demandis: „Ĉu Vi do intencas kunagi, *Sir*?“

„Memkompreneble!“

„Tion Vi laŭdece lasu, se Vi ne volas iĝi dispedbatita kaĉo dum dek minutoj! Bizono ne estas kanario, kiun oni metas sur la mano kaj aŭskultas ĝian kanton. Antaŭ Vi rajtos proksimiĝi al tia danĝera ĉasbesto, ankoraŭ multa bela kaj eĉ multe pli malbela vetero pasu trans la rokmontaro.“

„Sed mi ja volas—“

„Silentu kaj obeu!“ li interrompis min per sono, kiun mi neniam antaŭe aŭdis de li. „Mi ne volas turmenti mian konsciencon per Via morto. Alitempe faru, kion Vi volas, sed nun mi ne toleras kontraŭon!“

Se ne estus estinta tia bona rilato inter ni, estis nun la tempo por forta respondo je tio. Sed pro ĝi mi silentis kaj rajdis malrapide malantaŭ li en la ombro de la arbaro. Dum tio li klarigis al mi, nun rekalmiĝinte:

„Estas dudek bestoj, kiel mi vidas. Sed atendu, ĝis Vi vidas mil bestojn, aŭ eĉ pli da ili stamfe kuregi trans la savano! Mi foje vidis arojn de dek mil kaj pli! Ili estis la ĉiutaga pano de la indiano. La blankhaŭtuloj ĝin forprenis de li. La ruĝuloj flegumis la ĉasbestojn, ĉar ili estis lia nutro. Li ĉasis nur tiom multajn, kiom li bezonis. Sed la blankulo furiozis en la sennombraj aroj, kiel rabbesto, kiu eĉ mortigas plu, kiam ĝi satas, nur pro verŝi sangon. Kiel longe ĝi ankoraŭ daŭros, ĝis ne plu ekzistos unu bubalo, kaj mallonge poste ne plu ekzistos indiano, plendu al Dio! Kaj simile la afero estas pri la ĉevalaroj. Iam ekzistis aroj el mil mustangoj, kaj eĉ pli. Hodiaŭ oni ĝoju, se oni feliĉas vidi cent ĉevalojn je la sama ejo.“

Dume ni estis proksimiĝintaj al la bubaloj je distance de ĉirkaŭ kvarcent paŝoj, senke ili rimarkis nin. Hawkens haltigis sian ĉevalon. La bestoj paŝtiĝis, irante malrapide tra la valo. Plej antaŭe estis maljuna virbubalo, kies gigantan korpon mi rigardis per miro. Li estis ĉirkaŭ du metrojn alta, kaj certe tri metrojn longa. Tiutempe mi ne jam ne kapablis taksi la pezon de bizono. Hodiaŭ mi kredas, ke tiu pezis certe tridek centfuntojn, tute miriga amaso el karno kaj ostoj. Li esti trovinta ŝlimejon, kaj sin rulis en ĝi komforte.

„Tiu estas la estra virulo“, Sam flustris, „la plej danĝera el la tuta kompanaro. Kiu volas ludi kun tiu egulo, pli bone estas subskribinta sian testamenton. Mi prenos la junan bizoninon tie malantaŭ dekstre. Atentu, kien mi donos al ŝi la kuglon! Malantaŭ la skapolon, de la flanko diagonale en la koron. Tiu estas la plej bona, eĉ la sole certa pafo, escepte de tiu en la okulon. Sed kiu ankaŭ estos tiel malsingarde, ataki bizonon de antaŭe pro trafi ĝian okulon? Restu tie ĉi kaj kaŝu Vin kaj Vian ĉevalon en la arbedaĵon. Kiam ili vidos min, kaj fuĝos, la stampedo pasos ekzakte tie ĉi. Eĉ ne ekideu forlasi tiun ejon, antaŭ mi revenos aŭ vokos Vin!“

Li atendis, ĝis mi estis kaŝiĝinta inter du arbedojn. Tiam li ekrajdis, malrapide kaj mallaŭte. Mi havis tre strangan senton. Mi ofte legis, kiel oni ĉasis bubalon. Pri tio oni ne povis rakonti unu novaĵon al mi. Sed estas diferenco inter la papero, sur kiun oni presas tiajn priskribojn, kaj la sovaĝejo, en kiu oni spertas la ĉason. La unuan fojon en mia vivo mi vidis bubalojn. Kiujn ĉasbestojn mi pafis antaŭe? Kompare al tiuj gigantaj, danĝeraj bestoj, fakte neniujn. Tial oni povas supozi, ke mi certe estus kontenta pri la ordono de Sam kondukti kviete. Fakte ĝi estis tute male. Mallonge antaŭe, mi nur volis kaŝe aŭskulti kaj rigardi. Nun mi sentis nerezisteblan impulson kunĉasi.

Do Sam volis preni la junan inulon. Fil, mi pensis, oni ne bezonas kuraĝon por tio. Vera viro ja elektas ĵus la plej fortan virbubalon!

Mia ĉevalo malkvietis. Ĝi dancumis sur la loko, neniam antaŭe vidinte bubalojn, timis, kaj volis fuĝi. Nur pene mi povis retenigi ĝin. Ĉu mi ne tamen kunagu je la ĉasado? Mi ne estis ekscigita, sed pripensis tute kalme. Tiam ekdecidis la cirkonstancoj de la momento.

Sam estis mallongigita la distancon al la bizonoj al tridek paŝoj. Tiam li donis la spronojn al sia ĉevalo kaj galopis al la aro, pasante la virbizonon pro povi pafi al la bizonino, kiun li montris al mi. Ĝi hezitis kaj maltrafis la ŝancon fuĝi. Li atingis ĝin. Mi vidis, ke li pafis al ĝi pasante. Ĝi ekskuiĝis kaj mallevigis la kapon. Ĉu ĝi falis, mi ne sciis. Mia atento estis direktita al io alia.

La giganta virulo ekstariĝis. Li fiksrigardis Sam Hawkens:on. Kia majesta besto! Tiu dika kapo kun la kurba kranio, la vasta frunto kaj la mallongaj, fortaj, suprenstarantaj kornoj! Tiuj densaj, taŭzitaj haroj sur kolo kaj brusto! Jes, tiu estis danĝera kreaĵo. Ĝia aspekto vekigis la deziron konkurigi homan kapablon kun tiu sovaĝa, besta fortego.

Ĉu mi volis, aŭ ĉu mi volis ne? Mi ne sciis. Mia rozfelulo eksaltis el la arbedaĵo, kaj strebis maldekstren. Mi ŝiris ĝin dekstren, kaj kuregis al la virbubalo. Ĝi aŭdis min veni kaj turniĝis al mi. Tiam ĝi mallevigis la kapon pro akcepti la rajdanton kaj la ĉevalon per la kornoj. Mi aŭdis Sam:on kriegi per plena forto, sed ne havis tempon vidi al li. Doni kuglon al la virulo ne eblis. Unue ĝi ne staris ĝuste pro alpafo, kaj due la ĉevalo ne obeis al mi. Ĝi kuregis per timo ĵus rekte al la minacaj kornoj. La bubalo ĵetis siajn malantaŭajn kruojn flanken, kaj la kapon supren per fortega puŝo, pro trapiki mian rozfelulon. Per efikigo de ĉiuj miaj fortoj, mi sukcesis flankenigi la ĉevalon iomete. Ĝi flugis per granda arko trans la malantaŭo de la bubalo, dum la kornoj de la besto tre proksime puŝiĝis maltrafante al miaj kruoj.

Nia salto kondukis nin rekte sur la ŝlimejon, en kiu la bubalo estis ruliĝinta. Mi vidis ĝin, kaj prenis miajn piedojn el la ingoj. Tio estis mia feliĉo. La ĉevalo glitis, kaj ni falegis. Kiel ĉi ĉio povis okaziĝi tiel rapide, estas ankoraŭ hodiaŭ nekomprenebla al mi. Jam je la neksta momento mi staris rekte, flanke de la ŝlimejo, la pafilo fikse en mia mano. La bubalo turniĝis al ni, kaj kuregis per nelertaj saltoj al la ĉevalo, kiu estis sukcesinta stariĝi kaj provis fuĝi. Dum tiu la bubalo ofertis sian flankon al mi alpafeble. Mi celis. Nun la peza ursmortigilo pruvigu la unuan fojon en kazo de danĝero. Per unu salto la bubalo estis atinginta la ĉevalon. Mi lanĉis — la bubalo ekhaltis meze en la kurado, ĉu per la ektimo pri la pafado aŭ ĉar mi bone trafis, tion mi ne sciis. Mi tuje donis duan kuglon al ĝi. Ĝi malrapide levis la kapon kaj elpuŝis laŭtegan blekon, ŝanceliĝis momenton jen kaj reen, kaj tiam kolapsis ĵus kie ĝi estis.

Pleĝate mi estus hele kriinta per ĝojo pri tiu pena venko, sed farendis pli gravaj aĵoj. Mia ĉevalo kuregis senrajdule dekstren, dum mi vidis Sam Hawkens:on galopadi sur la dekstra rando de la valo. Li estis sekvata de virulo, kiu estis ne multe pli malgranda ol mia virulo.

Furioza bizonu ne lasas fuĝi kontraŭulon, kaj dum tio eĉ kapablas rapidiĝi kiel ĉevalo. Ĝi aperigas en tiuj kazoj ruzecon kaj eltenpovon, kiun neniu estus ekspektinta pri ĝi.

Tiamaniere ankaŭ tiu virbubalo iĝis danĝere proksime al la rajdanto. Pro saviĝi de ĝi, Hawkens devis fari la pler riskajn turniĝojn, kiuj lacigis la ĉevalon. Fakte ĝi ne eltenis tion samlonge kiel la bubalo. Helpo do estis urĝe necesa. Mi ne havis la tempon kontroli, ĉu mia virulo vere mortis. Rapide mi ŝarĝis ambaŭ tubojn de la ursmortigilo kaj kuris al la alia flanko de la valo. Sam vidis min. Li volis veni al mi kaj ŝiris sian ĉevalon en mian direkton. Tio estis ega misago. La virbubalo malantaŭ li nun atingis la flankon de la ĉevalo rekte antaŭ si. Mi vidis, kiel li mallevigis la kornojn. Unu puŝo — kaj ĝi levigis la ĉevalon kune kun la rajdanto en la aeron, kaj faligis ilin ambaŭ teren. Tiam ĝi traktis ilin per furiozaj puŝoj. Sam kriis pro helpo, kiel li kapablis krii. Mi ankoraŭ estis cent kvindek paŝojn for, kaj devis ne atendi unu momenton plu. La pafo ja estus estinta pli certe de pli malgranda distanco, sed se mi estus atendinta, Sam estus pereinta. Mi ekĉesis kuri, celis sub la skapolon, kaj pafis. La bubalo levis la kapon per movo, kvazaŭ ĝi volis aŭskulti, kaj malrapide turniĝis. Tiam ĝi ekvidis min, kaj venis kurege al mi, sed ĉiam pli malrapidiĝis. Restis sufiĉe da tempo al mi reŝarĝi la elpafitan tubon. Mi finigis tion, kiam la bubalo estis nur tridek paŝojn for.

Ĝiaj movoj nun estis plu nur malrapida trotu. Kun profunde mallevigita kapo kaj sangoplenajn, kruele fiksrigardaj okuloj ĝi venis rekte al mi, pli kaj pli proksimen kiel malica sorto, kiu ne estis haltigebla. Mi surgenuiĝis kaj celis. Tiu movo iĝis la bubalon ekstari kaj levi la kapon iomete, pro vidi min pli bone. Nun mi havis la malicajn okulojn rekte antaŭ miaj tuboj. Mi sendis unu kuglon en la dekstran, kaj la duan en la maldekstran okulon. Mallonga tremo iĝis tra ĝia korpo, tiam la grandega koloso falis teren.

Mi eksaltis sur la piedojn pro kuri al Sam. Sed tio ne necesis, ĉar li jam estis veninta al mi.

„Nul!“ mi vokis. „Vi vivas, ĉu? Vi ne estas serioze lezita, ĉu?“

„Tute ne“, li respondis. „Nur la dekstra kokso doloras per la falo, aŭ estas la maldekstra, se mi n'eraras. Mi ne povas ĝin ekkoni tiel ekzakte.“

„Kaj kio pri Via ĉevalo?“

„Forgesindas. Ja ankoraŭ vivas, sed la bubalo malfermŝiris ĝian ventron tute. Ni mortpafu ĝin, pro mallongigi ĝian suferadon. Ĉu la bizonu mortas?“

„Esperendas. Ni ekzamenu ĝin.“

Ni certiĝis, ke estis ne vivo plu en ĝi. Tiam Hawkens diris per profunda spirajo:

„Kia penego tiu maljuna, naŭza bovaĉo estis al mi. Bubalino certe estus estinta pli ĝentile al mi. Oni ja certe ne supozu virbubalojn esti *ladylike*, hihihih!“

„Kiu estis la kaŭzo, ke al ĝi ekvenis la stulta ideo ataki Vin?“

„Ĉu Vi ne vidis tion?“

„Ne.“

„Mi mortpafis la bovinon. Ĉar mia ĉevalo haltiĝis tro rapide, ĝi je mia ĉagreno proksimiĝis al la virbubalo. Tiu ne povis toleri tion kaj atakis min. Mi ja tuje donis la duan kuglon el mia Liddy al ĝi, sed ŝajne eĉ tio ne prudentigis ĝin. Li montris inklinon al mi, kiun mi ankaŭ per

plej bona volo ne povis redoni. Ĝi ĉasis min tiel, ke mi ne sukcesis reŝarĝi la pafilon. Mi ĝin forĵetis, ĉar ja tute ne utilis plu, kaj tiel mi havis liberajn manojn por la kondukiloj de mia ĉevalo, se mi n'eraras. Tamen la bedaŭrinda ĉevalo ne sukcesis saviĝi.“

„Ĉar Vi faris tiun lastan rapidan, fatalan turnon. Vi estu rajdinta arkon. Tiukaze la ĉevalo estus savita.“

„Estus savita! Vi ja parolas kiel spertulo. Tio oni vere ne ekspektu de *greenborn*.“

„*Pshan!* Ne ĉio ĝenerale aĉas je *greenborn*.“

„Jes, se Vi ne etus ĉeestinta, mi nun kuŝis tie, same kiel mia disŝirita ĉevalo. Ni iru vidi al ĝi.“

Ni ĝin trovis en malĝojiga stato. La intestoj pendis el ĝia malfermŝirita ventro. Ĝi spiregis per doloro. Sam iris serĉi sian forĵetitan pafilon, ĝin alportis, ŝarĝis, kaj donis la liberigan pafon al ĝi. Tiam li demetis la kondukilojn kaj la selon, kaj diris:

„Nun mi estas mia propra ĉevalo, kaj portas mian selon sur la dorso. Tio rezultas, kiam oni konkuriĝas kun virbubalo.“

„De kie Vi nun ricevos novan ĉevalon?“ mi demandis.

„Tio estas mia plej malgranda zorgo. Mi kaptos unu, se mi n'eraras.“

„Mustangon, ĉu?“

„Jes. La bubaloj estas tie ĉi. Ili komencis la migradon suden. Do ankaŭ la mustangoj certe baldaŭ aperos.“

„Ĉu mi rajtas ĉeesti, kiam Vi kaptos mustangon?“

„Certe. Vi ankaŭ ŝpertu tion. Sed nun venu. Ni iru ekzameni la maljunan virbubalon. Eble ĝi ankoraŭ vivas. Tiuj metuzalemoj kutimas havi eksternorme persisteman vivon.“

Ni iris al ĝi. La besto mortis. Nun oni povis admiri la gigantajn formojn eĉ pli bone ol antaŭe. Sam lasis sian vidon alterni inter mi kaj la virulo, faris tute nepriskribeblan grimacon, skuis la kapon, kaj diris:

„Estas ne klarigebla, entute ne klarigebla! Ĉu Vi scias, kie Vi trafis ĝin?“

„Nu, kie?“

„Ĵus je la ĝusta loko. Ĝi estas pramaljuna ulo, kaj mi estus pripensinta almenaŭ dek fojojn, antaŭ mi estus riskinta ataki ĝin. Ĉu Vi scias, kio Vi estas, *Sir?*“

„Kio?“

„La plej malprudenta homo, kiu ekzistas!“

„Ho ho! Malprudenteco neniam estis unu el miaj difektoj.“

„Do nun Vi estas kutimiĝanta ĝin. Komprenendas. Mi ja ordonis al Vi, ke Vi fortenu Viajn manojn de la bubalo kaj restu en la arbedaĵo. Kial Vi ne obeis al mi?“

„Tion mi ne scias mem.“

„Nu! Vi faris ion sen scii la kaŭzon. Ĉu tio ne estas malprudenta?“

„Mi kredas, ke ne. Certe ja estis iu grava kaŭzo.“

„Tiukaze Vi ja konu ĝin!“

„Eble ĝi estas tiu, ke Vi ordonis ion al mi, kaj ke mi ne permesas, ke iu ordonas al mi.“

„Nu! Kiam oni volas zorgi nur pri Via bonfarto kaj avertas Vin pri danĝero, Vi estas ĵus tiukaze tiel obstinema Vin igi en danĝeron?“

„Mi ne venis en la okcidenton pro eviti ĉiun danĝeron, kiu ĉi tieas.“

„Nu bone. Sed Vi ankoraŭ estas *greenborn* kaj pli bone Vin gardu. kaj eĉ se Vi ne volas obei al mi, kial Vi nur elektis tiun egan fibeston, anstataŭ bovino pro pruviĝi?“

„Ĉar tio ŝajnis al mi pli bravece.“

„Bravece! Tiu *greenborn* volas ludi la bravulon, se mi n'eraras, hihihihili!“

Sam subridis tiel, ke li devis teni sian ventron, kaj tiam amuzigite aligis:

„Kiam vera okcidentulo faras ion, neniam gravas al li, ĉu tio estas bravece, sed ĉu tio estas utila al li.“

„Sed tio ja estis la fakto ĉi kaze.“

„Ĉi kaze, ĉu? Kial?“

„Mi elektis la virbubalon, ĉar ĝi havas multe pli da viando ol inulo.“

Momenton li rigardis min senkomprene, kaj tiam elvokis:

„Pli da viando, ĉu? Ĉi tiu juna viro mortpafis la virbubalon pro la viando, hihihihili! Kredeble Vi eĉ dubis pri mia kuraĝo, ke mi atakis nur bubalinon, ĉu?“

„Ne vere, mi nur supozis, ke ĝi estus pli kuraĝe elekti beston fortan.“

„Kaj manĝi virulan viandon, ĉu? Kia eksternorme saĝa homo Vi estas, *Sir!* Tiu virulo jam portas la pezegon de dek aŭ eĉ dudek jaroj. La viando de tiu besto estas malmola kiel tanita led. Eĉ se Vi rostus aŭ kuirus ĝin taglonge, Vi tamen ne eblos dismordi ĝin. Ĉiu sperta okcidentulo plie preferas bubalinon ol virbubalon, ĉar ties viando estas pli softa, kaj pli sukhava. Jen Vi refoje vidas, kia *greenborn* Vi estas. Mi ne havis la tempon rigardi Vin. Kiel la malprudenta atako al la bubalo do okazigis?“

Mi rakontis ĝin al li.

Kiam mi finis, li mezuris min per grandaj okuloj, skuis la kapon, kaj ordonis:

„Iru kaj alportu Vian ĉevalon. Ni ĝin bezonas, ĉar ĝi portu la viandon, kiun ni kunprenos.“

Mi plenumis tiun peton, treege elrevigite pri lia stranga konduto. Li estis aŭskultinta mian rakonton, sen diri nur unu vorton. Mi certis, ke mi meritis iom da agnosko. Anstataŭ li diris nenion, sed nur forsendis min venigi mian ĉevalon.

Kiam mi alkondukis ĝin, Sam surgenuis apud la bubalino, kiun li mortpafis. Li estis fortirinta la felon de unu malantaŭa kruro, kaj nun detranĉis la lumbaĵon.

„Do“, li diris, „tio estos rostaĵon ĉi vespere, kiel ni delonge ne havis unu. Ni metos tiun lumbaĵon, la selon kaj la kondukilojn sur Vian ĉevalon. Ĝi estu nur por Vi, Will, Dick, kaj mi. Se la aliaj ankaŭ volas iom, ili rajdu ĉi tien kaj haviĝu la bubalinon meme.“

„Se ĝi ne estos dume formanĝinta de kadavrobirdoj, aŭ aliaj sovaĝaj bestoj.“

„Nu, kiel saĝa Vi estas denove! Kompreneblas per si mem, ke ni kovros ĝin per branĉoj, kaj poste metos ŝtonojn sur ĝin. Ja devus veni nur urso, aŭ alia granda rabbesto, se iu volus formanĝi la viandon.“

„Mi tranĉis dikajn branĉojn de proksima arbedaĵo, kaj alportis pezajn ŝtonojn. Per tiuj ni kovris la bubalinon, tiam ni ŝarĝis mian ĉevalon.“

„Kio okazos al la virbubalo?“ mi demandis Sam:on.

„Al ĝi? Kio okazu al ĝi?“

„Ĉu ne io ajn de ĝi utilas al ni? Eĉ ne la led, ĉu?“

„Ĉu Vi estas tanisto? Mi ne.“

„Sed mi legis, ke la haŭtoj de mortpafitaj bubaloj estas kaŝataj en tiel nomataj *cache*-oj, kaj tenadataj.“

„Nu, Vi legis tion, ĉu? Do, se Vi legis tion, ĝi ja certe devas esti la vero. Ja ĉio, kion oni povas legi pri la Sovaĝa Okzidento ja estas la vero, tuta kaj plena vero, hihihih! Fakte jes, la okzidentuloj ĉasas la bestojn pro la feloj. Ankaŭ mi faris tion. Sed hodiaŭ ni ne apartenu al tiu speco, kaj rezignu pri pene porti tiun pezan haŭton kun ni.“

Ni ekiris, kaj atingis la tendejon jam duonan horon poste, kvankam ni iru piede.

La fakto, ke ni venis piedire, kaj ne kunhavis la ĉevalon de Sam, kaŭzis atenton. Ni estis demandataj pri la kialo.

„Ni ĉasis bubalojn, kaj dum tio mia ĉevalo estis disŝirata de virulo“, Sam Hawkens respondis.

„Ĉasis bubalojn, ĉu? Bubalojn, bubalojn!“ ĉiu buŝo sonigis. „Nu kie, kie?“

„Iomete malpli ol duona horo for de tie ĉi. Ni kunprenis la lumbaĵon. Vi povas havi la reston.“

„Tion ni havos, jes, ni havos ĝin“, vokis Rattler, kiu agis kvazaŭ nenio okazis inter li kaj mi. „Kie ĝi estas?“

„Rajdu laŭ nia spuro, kaj vi trovos la lokon. Vi ja havas sufiĉe da okuloj, se mi n'eraras.“

„Kiom da bestoj estis tie?“

„Dudek.“

„Kaj kiom vi mortpafis?“

„Unu inulon.“

„Ĉu nur? Kien iris la aliaj?“

„For. Vi povas serĉi ilin. Mi ne zorgis, pri kien ili volis promeni, kaj ankaŭ ne demandis ilin, hihihih!“

„Sed nur unu inulon! Du ĉasistoj, kiuj nur mortigas unu el dudek bubaloj!“ iu el ili diris malestime.

„Ĝin faru pli bone, se Vi povas, *Sir!* Tre verŝajne Vi estus mortpafinta ĉiujn dudek, kaj eble eĉ pli da ili. Cetere Vi trovos, kiam Vi alvenos tie, du maljunajn, dudekjarajn virulojn, kiujn tiu juna *gentleman* mortpafis.“

„Virulojn, maljunajn virulojn!“ ĉiu vokis. „Pafi dudekjarajn virulojn! Kia greenhorn oni estu por fari tian stultaĵon!“

„Egalas al mi, ĉu Vi ridas pri tio, *mesŝur*-oj. Sed nur vidu al al viruloj! Vi sciu, ke li savis mian vivon per mortpafi ilin!“

„La vivon, ĉu? Kial?“

Ili estis scivolaj pri la aventuro, sed li rifuzis la informon.

„M'ne volas paroli pri tio nun. Lasu lin mem rakonti ĝin, se Vi supozas ĝin saĝe haviĝi la viandon nur kiam ĝi jam malhelas.“

Li pravis. La suno jam malleviĝis, kaj post mallonga tempo ĝi estus malhela. Ĉar ili ekkomprenis, ke mi ne krome volis roli kiel rakontisto, ili ĉiuj surĉevaliĝis kaj forrajdis. Ĉiu, ĉar neniu volis ricevi nenion. Neniu el ili konfidis la alian. Inter decaj ĉasistoj, ĉiu ĉasita viando estis posedaĵo de ĉiuj. Sed inter tiuj homoj, tia justa partigo ne estis ekspektebla. Do

kiam ili revenis, mi laŭekspekte aŭdis, kiel ili ĵetis sin sur la bubalinon kiel sovaĝuloj. Ĉiu klopodis, kverelinte kaj malbeninte, deŝiri por si laŭeble grandan kaj bonan viandopecon.

Kiam la bruo malaltiĝis, ni prenis la lumbaĵon kaj la selon de mia ĉevalo. Mi forkondukis la beston apud la tendejon, pro senbridigi kaj fiksligi ĝin. Dum tio mi malrapidis, tiel ke Sam Hawkens trovu la ŝancon rakonti nian aventuron al Parker kaj Stone. Inter mi kaj ili estis tendo. Do ili ne povis aŭdi min, kiam mi revenis. Kiam mi ne plu estis malproksime plu, mi aŭdis Sam:on diri:

„Nur ĝin kredu. Estis ekzakte, kiel mi diris! Tiu ulo ataktis rekte la plej grandan kaj plej fortan virulon, kaj pafis ĝin teren kiel maljuna, sperta bubalĉasisto! Certe mi agis, kvazaŭ mi reagis kvazaŭ tio estis malprudentaĵo. Mi lin riproĉis laŭdece. Sed m'scias, kion mi pensu pri li.“

„Mi ankaŭ“, Stone konsentis. „Li estos brava okzidentulo iam.“

„Eĉ tre baldaŭ“, mi aŭdis Parker:on diri.

„Yes“, Sam Hawkens certigis. „Sciu, li estis naskita pro tio, verece kaj tute laŭregule. Kaj konsideru la korpa forto! Ĉu vi vidis lin hieraŭ, kiam li fortiris nian pezan ĉaregon, tute sole, sen ke iu helpis al li? La teron, kiun li batas, ne portos herbon post tio dum jaroj. Sed, ĉu vi bonvolas promesi unu aĵon al mi?“

„Kiun?“ Parker demandis.

„Ne lasu lin scii, kion ni pensas pri li.“

„Kial ne?“

„Ĉar tio eble orgojligos lin.“

„Ho ne!“

„Ho jes! Li estas tute modesta ulo, kaj tute ne ema al orgojlo. Ĉiukaze estas misago, kiam oni aŭdas homon nepripensite. Oni povas fuŝigi eĉ la plej bonan karakteron per tio. Do nomu lin *greenhorn* senzorge. Kaj li estas unu, fakte! Li ja posedas ĉiun econ, kiun deca okzidentulo devas havi, sed malgraŭ ĉio li ne jam finmaturiĝis. Li bezonas multon da sperto plu.“

„Ĉu vi dankis al li, ke li savis vian vivon?“

„Ne ekideis al mi.“

„Ĉu ne? Kion li do pensu pri vi?“

„Tute egalas al mi, kion li pensas pri mi, se mi n'eraras. Kompreneble li supozas, ke mi estas ignorema kaj maldankema fiulo. Sed tio ne gravas. Pli gravas, ke li restos, kiel li estas. Mi multe plej ŝate estus brakuminta lin, vere.“

„Fi!“ Stone elvokis. „Brakumata de vi! Do vi neniam havis spegulon en via mano, ĉu? Tia vizaĝo, tia barbo kaj tiu nazo! Ajn iu, kiu havas la sensencan ideon akcepti vian brakumon, aŭ stultiĝis per troo da suno, aŭ lia cerbo enfrostiĝis per troo da malvarmego.“

„Nu! Ha! Hm! Tio ja vere sonas amikece de vi!“ Sam Hawkens grumblis. „Do vi pensas, ke mi estas malbelega ulo! Sed kio estas vi, laŭ via opinio? Do bela homo, ĉu? Ne ekhavu la ideon! Mi promesas al vi: se ni ambaŭ volus partopreni en beleca konkuro, gajnos la premion mi! Sed vi, vi estus gajnonta konsoligan kompatodonacon, hihihih! Sed ni ne parolu plu pri tio. Ni parolis pri nia *greenhorn*. Mi ne dankis al li, kaj ne dankos. Sed kiam nia lumbaĵo estos rostita, li ricevu la plej bonan kaj plej sukan parton. Mi detranĉos ĝin mem, li vere meritigas ĝin. Kaj sciu, kion mi faros morgaŭ!“

„Kion?“ demandis Stone.

„Grandan plezuron al li. Li rajtos kapti mustangon.“

„Ĉu vi volas ĉasi mustangojn?“

„Jes. Mi havu novan ĉevalon. Vi pruntu vian ĉevalon al mi por la ĉasado. Ja hodiaŭ la bubaloj aperis, do ankaŭ venos la mustangoj. Mi supozas, ke oni bezonas nur rajdi al la loko, kiun ni finmezuradis, kaj kie ni enterigis la fostojn por la fervojo. Tie estos la mustangoj, tuj kiam la sovaĝaj ĉevaloj aperos en ĉi regiono.“

Mi ne kaŝaŭskultis plu, sed ekiris kaj proksimiĝis al la tri ĉasistoj tra arbedaĵo, el tute alia direkto. Ili ne eksciis, ke mi kaŝe aŭdis ĉion.

Oni bruligis fajron kaj metis du branĉoforkojn en la teron flanke de ĝi. Tiuj estis la stabliloj de la rostoturnilo, kiu estis dika, rekta branĉo. Al tiu la tri fiksige la tutan lumbaĵon. Tiam Sam Hawkens komencis turni la trapikilon malrapide kaj per laŭarta sperto. La feliĉplena mieno, kiun li faris dum tio, kaŝe amuzis min.

Kiam la aliaj revenis kun la kroma viando, ili agis kiel ni, kaj ankaŭ bruligis plurajn fajrojn. Ĉar ĉiu volis rosti por si mem, la spaco ne sufiĉis. La konsekvenco estis, ke ili manĝis la rostaĵojn nur duone finrostitaj.

Mi vere ricevis la plej bonan parton. Ĝi pezis certe tri funtojn, sed mi finmanĝis ĝin. Sed oni ja ne supozu, ke mi estus multmanĝulo. Fakte mi manĝis pli malmulte ol aliaj. Sed al iu, kiu ĝin ne scias, aŭ spertis mem, estas preskaŭ nekredibla, kiajn amasegojn da viando unu okcidentulo povas manĝi, aŭ pli bone devas manĝi, se li volas pluvivi. Tio havas, inter aliaj, la kaŭzon, ke okcidentulo povas havi ĝin preskaŭ neniujn manĝaĵojn krom viando.

Mi iam vidis maljunan *trapper*-on finmanĝi ok funtojn da viando, senpaŭze. Kiam mi poste demandis lin, ĉu li satus, li respondis subride:

„Mi ja devas sati, ĉar mi ne havas pli. Sed se Vi volas doni al mi pecon da viando Via, Vi ne atendu eterne, ĝis Vi ne vidos ĝin plu.“

Dum la manĝado, la okcidentuloj malproksime al ni interparolis pri nia bubalĉaso. Kiam ili estis vidintaj la du virulojn, ili ekhavis alian opinion pri la ‚stulteco‘, kiun mi ŝajnite faris.

La sekvintan tagon mi agis, kvazaŭ mi volus eklabori. Sam venis al mi, kaj diris:

„Nur lasu Viajn ilojn resti, *Sir*. Endas fari ion, kio estas pli ekscita.“

„Kion?“

„Vi ekscios. Pretigu Vian ĉevalon. Ni ekskursos.“

„Promeni, ĉu? Ja tiukaze la laboro gravas plie.“

„*Pshaw!* Vi jam streĉiĝis sufiĉe. Krome mi pensas, ke ni jam estos reveninta je la tagmezo. Post tio Vi povos mezuradi kaj kalkukadi kiom Vi volas.“

Mi informis Bancroft-on. Poste ni ekrajdis. Survoje Sam kondukis tre sekretoplene. La rajdado reeniris laŭ la jam mezurita vojo, ĝis ni atingis la prerion.

Ĝi estis ĉirkaŭ tri kilometrojn larĝa, kaj duoble longa, kaj randata per arbarportantaj altaĵoj. Ĉar ĝi estis trafluata de larĝa, sed malprofunda rivereto, la tero havis sufiĉe da akvo kaj abundan herbaron. Norde estis aliro al la prerio inter du montoj, sude ĝi finiĝis en valon. Kiam ni estis atingintaj tiun valon, Hawkens haltigis sian ĉevalon, kaj eksploris vidis ĉirkaŭen trans la tuta ebena. Poste ni rajdi plu, nordan laŭ la rivereto.

Subite Sam ekkriis, ekstarigis sian ĉevalon, deseliĝis, saltis trans la rivereto kaj venis al loko, je kiu la herboj estis subenpremitaj. Li ekzamenis la lokon, revenis, surĉevaliĝis kaj rajdis plu, flankeniĝante dekstren, tielke ni atingis la okcidentan randon de la prerio. Tie li refoje deĉevaliĝis, kaj lasis sian ĉevalon manĝi la herbojn, sed fiksligis ĝin garde. Ekde la ekzameno de la loko, li ne estis parolinta unu vorton. Sed sur lia barba vizaĝo estis kontenta rideto, kiel sunbrilo sur arbara pejzaĝo.

„Ankaŭ deĉevaliĝu, *Sir*“, li nun postulis, „kaj fikse ligu Vian ĉevalon! Ni atentados tie ĉi.“

„Kial mi lugu ĝin?“ mi demandis, kvankam mi ekzakte sciis ĝin.

„Ĉar alikaze Vi certe perdos ĝin. Mi jam ofte vidis, ke ĉevaloj forkuras je tiu okazo.“

„Kiu okazoj?“

„Ĉu Vi ne havas ideon? Do provu diveni!“

„Ĉu mustangoj?“

„Kio igis Vin pensi tion?“ li demandis, dum li vidis al mi, suspekto kaj miriĝite.

„Ĉar mi legis, ke malsovaĝaj ĉevaloj emas forkuri kun la sovaĝaj mustangoj, se ili ne estas fikse ligitaj.“

„La diablo Vin prenu! Ĉion Vi legis! Ja vere ne eblas surprizigi Vin. Do oni vere ŝatu la homojn, kiuj ne kapablas legi!“

„Ĉu Vi volis surprizigi min?“

„Certe.“

„Per mustangoĉaso, ĉu?“

„Jes.“

„Ne eblis facile. Surprizo ja kondiĉas, ke oni ne sciigas ion pri ĝi antaŭe. Sed Vi ja estu informinte min, antaŭke la ĉevaloj estus venantaj.“

„Prave, hm! Do sciu, la mustangoj jam estas tie ĉi.“

„Ĉu la premsignoj en la herboj estis ilia spuro?“

„Jes. Ili pasis ĉi tie antaŭhierau. Estis antaŭa aro, Vi sciu, io simila kiel esplorantoj. Mi diru al Vi, ke tiuj bestoj estas eksternorme ruzaj. Ili ĉiam lasas etan grupon rajdi antaŭe. Ili havas oficirojn, ekzakte kiel armeo. La estro de la aro ĉiam estas sperta, forta kaj kuraĝa virĉevalo. Egale ĉu ili restas aŭ moviĝas, ajn ĉiam ili formigas ĉirkaŭan cirkolon el virĉevaloj. Pli interne estas la ĉevalinoj, kaj centre en la mezo estas la idoj. Ii faras tion, proke la virĉevaloj povas defendi la ĉevalinojn kaj ĉevalidojn. Mi ja jam ofte montris al Vi, kiel kapti mustangon per lazo. Ĉu Vi do bone memoriĝis tion?“

„Memkompreneble.“

„Ĉu Vi emas kapti mustangon?“

„Jes.“

„Do Vi havos la ŝancon fari tion ĉi antaŭtagmezon, *Sir*.“

„Dankon, sed mi ne uzos ĝin.“

„Ĉu ne? *All devils!* Kial ne?“

„Ĉar mi bezonas ĉevalon.“

„Sed vera okcidentulo ja ne demandas, ĉu li bezonas ĉevalon aŭ ne!“

„Tiukaze li estas tute ne, kiel mi imagas veran okcidentulon. Hierau Vi parolis pri kadavroĉasistoj, pri blankhaŭtuloj, kiuj mortigas la bubalojn amase, sen bezoni la viandon. La

afero do estas same pri la ĉevaloj. Mi ne volas forrabi la liberecon de nur unu el tiuj belegaj bestoj, senke mi havas la senkulpigon, ke mi bezonas ĉevalon.“

„Tio estas dece pensita, *Sir*, tre dece. Sed kiu diris, ke Vi rabu la liberecon de ĉevalo? Vi ekcercadis ĵeti la lazon, kaj nun pruviĝu. Mi volas vidi, ĉu Vi sukcesos Vian ekzamenon. Ĉu Vi komprenis?“

„Tio estas io alia. Mi kunagos.“

„Bone. En mia afero, ĝi kompreneble ne estas pura plezuro. Mi bezonas ĉevalon kaj havigos unu. Mi ĝin ofte diris al Vi, kaj ĝin diras nun denove: sidu tute fikse en la selo, kaj stabiligu Vian ĉevalon bone, kiam la lazo estreĉiĝos, kaj la tirego ekokazos. Se Vi ne faros tion, Vi estos ŝiregata teren; la mustango forkuros, kaj kune fortiros Vian ĉevalon per la lazo.“

Li volis paroli plu, sed eksilentis subite, kaj montris per la mano al la du montoj je la norda fino de la prerio. Tie aperis unu sola, unuopa ĉevalo. Ĝi kuris malrapide antaŭen, direktigis la kapon ŝanĝe al ambaŭ flankoj, kaj ensuĉis la aeron tra la naztruo.

„Ĉu Vi vidas ĝin?“ Sam flustris. Per ekscito li parolis tute mallaŭte, kvankam la ĉevalo neeble povis aŭdi nin. „Ĉu mi ne diris, ke ili venos? Tiu estas la esploranto, kiu ekzameni, ĉu la loko estas sava. Ruza virĉevalo! Kiel ĝi okulumas, kaj flarumas al ĉiuj direktoj! Ĝi ne jam ekkonis nin, ĉar la vento blovas al niaj vizaĝoj. Tial mi elektis ĉi tiun lokon.“

Nun la mustango ektrotis. Ĝi kuris rekte antaŭen, poste dekstren, fine maldekstren. Tiam ĝi turniĝis kaj malaperis je la loko, kie ni estis vidintaj ĝin aperi.

„Ĉu Vi rigardis ĝin?“ Sam demandis. „Kiel saĝe ĝi kondukis, kaj uzis ĉiun arbedeton kiel kaŝejo, pro ne esti vidata! Neniu indiana esploristo ne povus agi pli bone.“

„Tio veras. Miriga afero!“

„Nun ĝi kuras reen pro anonci al sia kvarpieda generalo, ke la areo nedanĝeras. Sed fakte eraras, hihihih! Mi vetas, ke ili ĉeestos maksimume dek minutojn poste. Do atentu! Ĉu Vi scias, kiel ni ĝin faros?“

„Nu, kiel?“

„Vi nun rajdos reen, ĝis la fino de la prerio rapide, kaj tie atendos. Dume mi malaperiĝos al la malproksimo de la alirejo, kaj kaŝos min tie en la arbaro. Kiam la aro venos, mi lasos ĝin pasi, kaj poste mi ĉasos ĝin de malantaŭ. Ĝi fuĝos en Vian direkton. Kiam ĝi proksimiĝos, ili vidos Vin. Tiam ili fuĝos reen. Tiel ni pelos ilin inter mi kaj Vi, ĝis ni estos elektintaj la du plej bonajn ĉevalojn, kaj kaptos tiujn. El tiuj du mi poste elektos la pli bonan. La alian ni lasos forkuri. Ĉu Vi konsentas?“

„Kio igas Vin demandi? Mi ja scias nenion pri la ĉevalĉaso. Sed Vi estas sendube majstro de tiu fako, kaj mi obeos ĉiujn Viajn ordonojn.“

„*Well*, Vi tute pravas. Mi jam havis certan nombron da sovaĝaj mustangoj sub mi, kaj venkis ilin, kaj certe povas aserti, ke Vi tute ne diris stultaĵon per la vorto ‚majstro‘. Nu, foriĝu, alikaze la tempo pasiĝas, antaŭ ni estas je la ĝusta loko je la ĝusta tempo.“

Ni surĉevaliĝis kaj disrajdis, li norden, kaj mi suden. Ĉar mia peza ursmortigilo estis iom malhelpa al mi, mi unue volis ĝin lasi ie dum la ĉaso. Sed mi aŭdis, ke singardema okcidentulo fordonas sian pafilon nur en kazoj, je kiuj li povis esti tutplene certa, ke li ne bezonos ĝin. Tia kazo ĉi tiu estis ne. Ĝi eblis ĉiun momenton, ke ekaperis indiano aŭ rabbesto. Tial mi nur igis, ke la ‚olda *gun*‘ pendiĝis fikse al la rimeno, kaj ne povis bati min dum la rajdado.

Nun mi ekscigite atendis la ekaperon de la ĉevaloj. Mi haltis inter la antaŭaj arboj de la arbaro je la rando de la prerio, fiksligis unu finon de la lazo al la selligilo, kaj volvis la kroman lazon en rondaĵojn antaŭ mi, tielke mi povis ekpreni ĝin tuj, kiam venus la ĝusta momento.

La alia fino de la prerio estis tiel for de mi, ke mi ne povis vidi la mustangojn, kiam ili estus aperantaj tie. Mi ne estis estinta je mia posteno plenan kvaronan horon, kiam mi ekvidis en la foro amason da malhelaj punktoj, kiuj rapide pligrandiĝis. Estis la mustangoj, kiuj kuregis en mian direkton.

Iliaj kolharoj flirtis per la kurego, kaj la vostoĵoj destaris kiel plumaĵoj per la vento. Estis ĉirkaŭ tricent da ili. La tero ŝajnis tremi per iliaj piedoj. Antaŭ ĉiuj aliaj kuregis blanka virĉevalo, majesta besto, kiun ĉiu ŝate kaptus. Sed ekideus al neniuj preriĉasistoj rajdi blankan ĉevalon. Tiel hela besto estus malkaŝanta lin al ĉiu kontraŭulo, jam de fora distanco.

Nun estu la tempo, ke mi ekmontru min al la bestoj. De sub la arboj mi elrajdis en la liberon. Tio tuj efikis. La kondukanta blankĉevalo ekpuŝiĝis reen, kvazaŭ ĝi ricevis kuglon en la bruston. La tuta aro tuje haltis kaj hezitis. Aŭdebliĝis laŭta, tima spirego, tiam la aro fulmrapide turniĝis, kaj kuregis reen.

Mi sekvis pli malrapide, ĉar al mi ne estis urĝo. Sam Hawkens ja estis je la alia flanko, kaj certe ĝin estis pelonta reen al mi. Dum tio mi miris pri io, kio mallonge poste certiĝis al mi. Kvankam la bestoj estis haltintaj nur mallongan tempon antaŭ mi, ĝi ŝajnis al mi, kvazaŭ unu el ili ne estis ĉevalo, sed mulo. Mi certe povis erari, sed tamen kredis esti vidinta ĝuste. Mi volis atenti pri tio pli bone je la dua fojo. La mulo estis kurinta en la unua vico, rekte malantaŭ la estra blankĉevalo. Do ĝi verŝajne ne nur estis tolerata en la ĉevalaro kiel samspeculo, sed eĉ posedis altan rangon inter ili.

Post kelkan tempon la aro revenis, kaj returniĝis kiam ili ekvidis min, kiel antaŭe. Tio ripetiĝis kelkajn fojojn plu. Tiujfoje mi povis ekkoni la mulon inter la aliaj pli klare. Estis helbruna besto kun malhela strio sur la dorso. Malgraŭ la granda kapo kaj la longaj oreloj, ĝi estis vere bela besto.

Muloj estas pli facile varteblaj ol ĉevaloj, havas multe pli certan iradon kaj ne timevitas profundaĵojn. Sed aliflanke ili obstinemas. Mi vidis mulojn, kiuj pli ŝate lasis sin bati ĝismorte, ol fari nur unu paŝon antaŭe, kvankam ili ne estis ŝargataj, kaj la vojo antaŭ ili estis tute ebena. Ili simple tute ne volis.

Ŝajnis al mi, ke tiu ĉi mulo havis internan fajron, kaj kvazaŭ ĝiaj okuloj brilis pli hele kaj ruze ol tiuj de ĉevaloj. Mi decidis kapti ĝin. Evidente ĝi estis forkurinta de sia posedanto dum paskurego de sovaĝaj ĉevalaro, kaj restis ĉe ĝi.

Sam repelis la grupon al mi. La mustangoj povis plu kuri nek antaŭen, nek malantaŭen, do ili fuĝis flanken. Ni sekvis ilin. La aro sin disigis. Mi vidis, ke la mulo estis en la pli granda parto. Ĝi kuregis flanke de la blankĉevalo, kaj ŝajnis esti speciale rapida kaj persistema besto. Mi sekvis tiun grupon. Ŝajne ankaŭ Sam celis al ĝi.

„Ilin enmezigu, mi maldeskstre, Vi dekstre!“ li vokis al mi.

Ni donis la spronojn al niaj ĉevaloj, kaj nun ne plu nur rajdis malantaŭ la aro, sed rapidiĝis tiel, ke ni pli kaj pli atingis la ĉevalojn, kiuj pli kaj pli proksimiĝas al la rando de la arbaro. En la arbaron la ĉevaloj certe ne kurus, certe ili retuniĝus kaj intencus trapasi inter ni. Pro neobligi tion, ni rapide rajdis al la alia. La ĉevaloj diskuregis al ĉiuj flankoj, kiel aro de kokinoj en kiun

plonĝis akcipitro. La blankulo kaj la mulo, apartigita de la aliaj ĉevaloj, kurege trapasis inter ni. Ni ĉassekvis ilin. Dum Tio Sam vokis, jam svingante sian lazon super la kapo:

„*Greenborn* refoje. *Greenborn* eterne.“

„Kial?“

„Ĉar Vi intencas kapti la blankulon, kaj vere nur *greenborn* volas fari tion, hihihih!“

Mi respondis, sed li ne aŭdis min, ĉar lia laŭta rido superbruis miajn vorton. Li do pensis, ke mi celis al la blankĉevalo. Egale al mi! Tial mi lasis al li la mulon, kaj rajdis flanke tien, kie la aliaj mustangoj kuregis ĥaose jen kaj reen, blekante kaj spiregante per timo. Sam estis nun tiel proksime al la mulo, ke li ĵetis la lazon. La maŝo falis ĝuste. Ĝi kuŝiĝis ĉirkaŭ la kolon de la besto. Nun Sam devis halti, kaj stabile starigu sian ĉevalon sur la malantaŭajn krurojn, proke ĝi povus kompensi la ektiregon, kiam la lazo ekstreĉiĝus. Li ankaŭ faris tion, sed nur momenton tro tarde. Lia ĉevalo ne jam estis sufiĉe stabiliginta, kaj estis tirata teren per la fortega ektiro. Sam Hawkens flugis, farante grandiozan saltumon for tra la aero, kaj falis sur la teron. La ĉevalo rapide restariĝis kaj forkuris. Per tio la lazo perdis sian streĉon. La mulo regajnis liberon. Ĝi galopis for, kaj ŝiris la ĉevalon kun si trans la prerio, ĉar la lazo ja estis fiksigita al la selo.

Mi rajdis al Sam pro ekscii, ĉu li estis lezita. Li ekstarigis, kaj vokis al mi ektimiĝinte:

„Pro fulmotondro! Tiu fiĉevalo de Dick Stone simple fuĝis for de mi, kaj eĉ ne diris adiaŭon, se mi n’eraras!“

„Ĉu Vi estas lezita?“

„Ne. Ekelseliĝu kaj donu Vian ĉevalon al mi. Mi kaptu tiujn du fuĝulojn!“

„Ne ekideos al mi! Vi povus riski saltumon denove, kaj ambaŭ du ĉevaloj estos perdataj.“

Dum mi parolis, mi ekpelis mian ĉevalon plu, sekvante la mulon. Ĝi jam estis grandan distancon for, se nun havis interkonsentajn problemojn kun la ĉevalo. Unu volis kuri tien, la alia alidirekten. Ili malhelpis unu la alian, ĉar ili estis interligataj per la lazo. Tial mi atingis ilin post mallonga tempo. Ja la ideo uzi mian propran lazon neniam iĝis en mian menson. Mi ekkaptis la lazon, kiu interligis la du bestojn, volvis ĝin ĉirkaŭ mia mano, kaj nun estis certe, ke mi povis venki la mulon. Unue mi lasis ĝin kuri plu, kaj galopigis la du ĉevalojn malantaŭ ĝi, sed iom kaj iom pli forte tiris la lazon tiel, ke la maŝo ĉiam pli malvastiĝis. Per tio mi povis direktigi la mulon pli malpli bone. Per ŝajna lasado, mi igis ĝin kuri reen en granda arko al la loko, kie Sam Hawkens staris. Tie mi ektiris la lazon tiel forte, ke la kolo de la mulo estis kunpremegata. Ĝi ne povis spiri plu, kaj falegis surteren.

„Tiru, ĝis mi tenas la mulon firme, kaj tiam eklasu!“ Sam vokis.

Li saltis al ĝi, kaj stariĝis flanke de la besto, kvankam ĝi batadegis forte per la kruroj.

„Nun!“ li ordonis.

Mi ekklasis la lazon. La mulo regajnis spiron, kaj ekstarigis. Same rapide Sam estis saltinta sur ĝian dorson.

Kelkajn momentojn ĝi staris senmove, kvazaŭ glaciigita per ŝoko. Sed tiam ĝi ade enaeriĝis, foje antaŭe, foje malantaŭe. Poste ĝi saltegardis flanken per ĉiuj kvar kruroj, ĝibegis, sed la malgranda Sam sidis firme.

„Ĝi ne deigos min!“ li vokis al mi. „Nun ĝi provos la lastan rimedon, kaj kuregos for kun mi. Atendu min tie ĉi, mi ĝin rajdigos reen obeante!“

Sed li eraris. Ĝi forkuris tute ne kun li, sed subite sin faligis sur la teron kaj volviĝis. Tio povis rompi ĉiujn ripojn de la malgrandulo. Li devis iĝi el la selo. Mi saltis de la ĉevalo, ekkaptis la lazon, kiu moviĝis sur la tero, kaj plektis ĝin dufoje ĉirkaŭ dika trunko de arbedo. Dume la mulo estis deiginta sian rajdanton, kaj ekstariĝinta. Ĝi volis forkuri, sed la trunko solidis. La lazo streĉiĝis, kaj la maŝo denove eke malvastiĝis. La besto falegis sur la teron.

Sam Hawkens estis volviĝinta flanken. Li ekzamene palpumis siajn krurojn kaj ripojn, kaj mienis, kvazaŭ li manĝis acidan brasikon kun prunpureo, kaj diris:

„Lasu la fibeston kuri. Neniu ĝin venkos, se mi n'eraras.“

„Neniell! Mi ne lasas hontigi min de mulo, kies patro ne estis *gentleman*, sed azeno! Ĝi obeu! Atentu!“

Mi ŝiris la lazon de la trunko, kaj stariĝis kun vaste disigitaj kruroj super la beston. Kiam ĝi regajnis spiron, ĝi reekstariĝis. Nun pleje gravis tre forta femurpremo. Tiurilate, mi tre verŝajne estis unu klason super la malgranda Sam. Ripo de ĉevalo devas fleksiĝi per la premo de la femuroj de rajdanto; tio kumpremas la internaĵojn, kaj kaŭzas mortotimon. Dum la mulo provis deĵeti min, mi prenis la lazon, kiu pendis de la kolo de la besto, volvis ĝin ĉirkaŭ mia mano, kaj fikstensis ĝin je la nodo. Tuj kiam mi ekkonis, ke la besto volis faliĝi teren, mi kunpremis la maŝon.

Estis seriozega batalo. Mi komencis ŝviti el ĉiuj poroj; sed la mulo ŝvitis eĉ pli. La ŝvito fluis el ĝia korpo. De ĝia buŝo glutis ŝaŭmo en grandaj eroj. Ĝiaj moviĝoj iĝis pli malfortaj, ĝia furioza spirego iĝis mallonga tusado. Fine ĝi kolapsis sub mi, kiam ĝi perdis la lastan forton. Ŝajnis al mi, kvazaŭ ĉiuj miaj ligamentoj kaj muskoloj estis disŝiritaj.

„*Heavens*, kia homo Vi estas!“ Sam vokis. „Vi ja havas pli da forto ol tiu besto! Sed se Vi povus vidi Vian vizaĝon, Vi ektimus!“

„Kredeble.“

„Viaj okuloj eliĝas. Viaj lipj ŝvelas, kaj Viaj vangoj tute bluas!“

„Tio estas la konsekvenco, kiam oni estas *greenhorn*, kaj rifuzas lasi sin deĵeti, dum majstro de mustangoĉaso estas pli saĝa, lasas sin deviŝi, postke okazis al li, ke li ligis sian ĉevalon al mulo, kaj tiam permesis al ambaŭ bestoj promenadi for.“

Li faris bedaŭran mienon, kaj petis plende:

„Silentu pri tio, *Sir!* Mi diru al Vi, eĉ al la plej sperta ĉasisto kelkfoje povas okazi tia speco de malbonŝanceto. Vi, kontraŭe, nur havis du tre bonŝancajn tagojn hieraŭ kaj hodiaŭ.“

„Mi esperas, ke mi spertos kelkajn bonŝancajn tagojn kiel tiuj plu. Nu, kiel fartas Viaj ripoj kaj la aliaj ostetoj?“

„Mi ne scias. Mi ordigos kaj nombrigos ilin tuje, kiam pli bonfartos mi. Nun ili klakas loze ĉie en mia korpo. Tiu estas besto, kian mi neniam antaŭe havis inter miaj gamboj! Mi esperas, ke ĝi nun ekhavas prudenton!“

„Ĝi jam havas. Vidu, kiel elĉerpita ĝi tie kuŝas! Ni metu selon kaj bridilojn sur ĝi. Vi rajdos ĝon hejmen.“

„Sed ĝi certe reobstaklos!“

„Ne ekideos al ĝi. Tio estis sufiĉe por ĝi. Ĝi nun estas prudenta besto, kaj Vi estos feliĉa, ke Vi kaptis ĝin.“

„Jes, kreendas. Fakte mi volis ĝin kapti ekde la komenco. Vi ja volis kapti la blankĉevalo, kio estis granda stultaĵo.“

„Ĉu Vi scias tion tiel ekzakte?“

„Nu, certe, estis stultaĵo!“

„Mi ne parolis pri tio, sed pri Via certeco, ke mi volis kapti la blankulon.“

„Kion Vi do volis ĉasi anstataŭe?“

„La mulon ankaŭe.“

„Ĉu vere?“

„Jes. Mi ja estas *greenhorn*, sed eĉ mi scias, ke blanka ĉevalo ne taŭgas al sovaĝejmigrulo. La mulo plaĉis al mi, tuj kiam mi ekvidis ĝin.“

„Jes, Vi havas bonan komprencon pri ĉevaloj, tion oni konfesu.“

„Mi esperas, ke Via komprenco pri homoj estas same bona, kara Sam! Nun venu, kaj helpu al mi starigi la beston de la tero!“

Ni metis la beston sur siajn krurojn. Ĝi staris senmove, tremis je la tuta korpo, kaj eĉ ne obstinis, kiam ni surmetis la selon kaj la bridilojn. Kaj kiam Sam estis sidiginta sur ĝin, ĝi obeis al la kondukilo tiel vole kaj sensive kiel dresita ĉevalo.

„Ĝi estas havinta mastron antaŭe“, la malgrandulo diris, „kaj ŝajne li estis bona rajdanto. Mi ekkonas tion tuje. Certe ĝi estas forkurinte de li. Ĉu Vi scias, kiel mi nomos ĝin?“

„Ĉu?“

„Mary. Mi jam estis rajdinta alian mulon, kies nomo estis Mary. Do ne necesas pene elpensadi novan nomon.“

„Do nomiĝas Mary la mulo, kaj Liddy la pafilo!“

„Jes. Estas tre belaj nomoj, ĉiuj du. Ĉu ne? Kaj nun mi devas peti Vin, ke Vi faru grandan komplezon al mi.“

„Plezure. Kiun?“

„Bonvolu ne paroli pri tio, kio okazis tie ĉi! Tio estus treege afable de Vi.“

„Nesencaĵo! Estas afero de memkompreneco, ne de afableco.“

„Stulta okazo. Kiel la bando tie transe en la kampejo ekridus. se ili eksciis, en kia maniero Sam Hawkens haviĝis sian novan, karan Mary:n! Estus plezuro al ili, eĉ plezurego! Se Vi silentos pri tio, mi estos—“

„Bonvolu kvietiĝi!“ mi interrompis lin. „Tute ne necesas perdi nur unu vorton pri tio. Vi estas mia instruanto, kaj mia amiko. Kaj pli mi ja ne devas diri.“

Liaj etaj, ruzaj okuloj humidiĝis. Ekscigite li elvokis:

„Jes, Via amiko mi estas, *Sir!* Se mi nur scius, ke ankaŭ Vi volus donaci al mi iom da Via amikeco, tio estus granda, vera plezuro al mi.“

Mi ofertis mian manon al li, kaj respondis:

„Tiun plezuron mi povas facile fari al Vi, Sam. Vi povas certi, ke mi igis Vin en mian koron, kiel— kiel— nu, kiel bonan, afablan kaj honestan onklon. Ĉu tio sufiĉas al Vi?“

„Tute, *Sir*, tute! Mi estas tiel ravita, ke mi ĉi tuje volas fari replezuron al Vi. Diru al mi, kion mi faru! Ĉu mi— ĉu mi ekzemple tuj finmanĝu ĉi tiun novan Mary:n antaŭ Viaj okuloj, plene kaj tute?“

„Ĉesu!“ mi protestis. „Tiukaze mi perdis Vin, ĉar Vi ja devus krevi. Vi jam faris amason da plezuroj al mi, kaj certe eblos al Vi fari multajn amikecaĵojn al mi estonte. Lasu Mary:n kaj Vin vivantaj, kaj ni ekrajdu reen al la kampejo. Mi laboru.“

„Vi laboru, ĉu? Sed Vi ja laboris tie ĉi. Se tio ne estis laboro, mi ne plu scias, kion mi nomu laboro.“

Mi ligis la ĉevalon de Dick Stone al mia rajdobesto per la lazo, tiam ni ekrajdis. La mustangaro dume delonge malaperis. La mulo vole obeis sian rajdanton. Sam multfoje sur la vojo elvokis ĝoje:

„Ĝi havis bonan edukadon, tiu Mary, tre bonan edukadon! Mi sentas per ĉiu paŝo, ke mi estos rajdanta bonege ekde hodiaŭ. Nun ĝi rememoras, kion ĝi iam lernis, intertempe forgesis dum la tempo inter la mustangoj. Esperendas, ke ĝi ne nur havas temperamenton, sed ankaŭ bonan karakteron.“

„Se ĝi ne havas ĝin, Vi povas ĝin instrui al ĝi. Ĝi ne jam estas tro maljuna por tio.“

„Kiel aĝa Vi pritaksas ĝin?“

„Kvinjara, ne pli.“

„Estas ankaŭ opinio mia. Mi ekzamenos ĝin pli detale, ĉu tio ĝustas. Mi ŝuldas la beston al Vi, al neniu alia. Estis du malfeliĉaj tagoj por mi, tre tre malfeliĉaj. Sed estis honorigaj tagoj por Vi. Ĉu Vi estis kredinta, ke Vi spertus la bizonan, kaj eĉ ankaŭ la mustangan ĉason tiel baldaŭ sekve?“

„Kial ne? Oni ĉiam ekspektu ĉion, ĉi tie en la okzidento. Mi esperas ankaŭ sperti aliajn ĉasojn plu.“

„Hm, jes. Endas deziri, ke Vi tiam ankaŭ sukcesos same kiel hieraŭ kaj hodiaŭ. Hieraŭ Via vivo estis serioze endanĝerata. Vi riskis tro multe. Vi neniam forgesu, ke Vi estas *greenhorn*. Homo, kiu trankvile lasas proksimiĝi bubalon, kaj tiam pafas en ĝiajn okulojn! Ĉu oni iam spertis tion? Vi ankoraŭ estas sensperta, kaj subtaksis la bizonojn. Estonte estu pli atentema, kaj ne troe kredu Vin esti kapabla! La bizonĉasado estas tre danĝera. Ekzistas nur unu besto, kiu estas eĉ pli danĝera.“

„Kiu?“

„La urso.“

„Ĉu Vi parolas pri la nigra urso kun la flava buŝego?“

„La baribalo, ĉu? Ne ekideas al mi! Tiu estas tre komfortema kaj pacema besto, al kiu oni eĉ povas instrui kiel gladadi kaj trikadi. Ne, mi parolis pri la *grizzly*, la griza urso de la roka montaro. Vi ja legis ĉion, do Vi ankaŭ certe scias ĉion pri tiu ulo.“

„Jes.“

„Do ĝoju, se Vi neniam renkontos ĝin. Kiam ĝi stariĝas sur siajn malantaŭajn kruojn, ĝi estas pli ol duonan metron pli granda ol Vi. Vi igas ostokaĉon el Via kranio per nur unu mordo. Kiam li foje estas atakita kaj ĉagrenigita, ĝi ne kvietos, ĝi ĝi finfine estos disŝirinta kaj neiginta sian kontraŭulon.“

„Aŭ ĝi ĝi kuŝas sur la tero mem.“

„Hohoho! Jam denove Via malprudenteco aperigas! Vi parolas pri la forta, nevenkebla griza urso kun malestimo, kvazaŭ ĝi estus eta, sendanĝera lavurso.“

„Ne tute. Ne ideas al mi malestimĝin. Sed samcerte ĝi ne estas nevenkebla. Neniu besto nevenkeblas, same ne la grizurso.“

„Ankaŭ tion Vi legis, ĉu jes?“

„Jes.“

„Hm! Do mi kredas, ke Viaj libroj kulpas Vian neprudentecon. En ĉiauj aliaj aferoj Vi ja estas komprenema ulo, se mi n'eraras. Eĉ Vi certe estus preta kaj atakus la grizurson, ekzakte kiel la bubalojn hieraŭ.“

„Se mi ne havus alian eblecon — jes.“

„Alian eblecon, ĉu? Sensencaĵo! Kion Vi volas diri per tio? Ĉiu homo ĉiam havas alian eblecon, se li nur volas!“

„Tio signifas, ke li povas fuĝi, se li estas malkuraĝa. Tion Vi ja volis diri, ĉu ne?“

„Ne tute. Fuĝi antaŭ grizurso ne estas malkuraĝaĵo, male, estas pura sinmortigo ataki ĝin.“

„Pri tio ni malsamopiniis. Se ĝi surprizus min, kaj ne lasus tempon al mi pro fuĝi, mi ja defendiĝu. Se ĝi atakus kamaradon, mi ja helpu al tiu bedaŭrindulo. Tiuj jam estas du kazoj, en kiuj mi nek povas nek devas fuĝi. Krome facile penseblas, ke brava okzidentulo atakus la grizan urson sen la devo neigi ĝin, sed pro la flankafera kromaĵo haviĝi ege bongustajn ŝinkaĵojn kaj piedegojn.“

„Vi estas homo tute neinstruebla. Mi komencas zorgi pri Vi treege. Danku al Dio, se Vi neniam gustos tiujn ŝinkaĵojn kaj piedegojn! Sed, mi ja ne volas nei, ke ne ekzistas pli bone gustaj delikataĵoj en la tuta konata mondo.“

„Fakte Vi ne bezonas zorgi pri mi jam nun. Aŭ ĉu ekzistas grizaj ursoj eĉ en ĉi regiono?“

„Kial ne? La grizurso ekzistas en la tuta montaro. Ĝi sekvas la riverojn, kaj foje eĉ iras for en la prerion. Ĝi estas treege malamikeca fibesto! Ni ne parolu pli pri ĝi!“

Ni plurajdis, silente.